

katolika sento

2

JARO 54^a

U.E.C.I.



75



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)



Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBETTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBETTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. 2500

Abonkotizo italliroj 2500

KATOLIKA SENTO

n.º 2

54a Jaro

Februaro 1975

LA VALORO DE LA LIBERA KAJ SUVERENA ELEKTO DE LA FRAŬLECO

(La Sankta Patro faris la jenan homilion dum la so
lena rito, kiun li prezidis en la Baziliko de S.ta
Petro, je la 2a de januaro, tago de la Kandelfesto):

Respektataj Fratoj kaj Fratinoj en Kristo, kaj vi
ĉiuj Filoj tre karaj!

Antikva festo, kiu en la ĵus aŭskultita Evangelio ha
vas sian malproksiman kaj ĉiam vivan radikon, festo, en
kiu Kristo aperas kiel protagonisto en la ofero, kiu es
tas farata pri Li, Filo de l' homo, al la ĉiela Patro, fe
sto, en kiu la Dipatrino, vualita kaj brila, en la kadro
de la biblia rito, tiu de la purigo superflua por ŝia dia
patrineco, sed elradianta ŝian superan virgecon, unua
foje aperas en la oficiala historio de la roma liturgio
(vd. Duchesne, Liber` Pont. 1,376), nin kunigas hodi
aŭ en ĉi tiu templo grandioza kaj mistera, kiu, gardan
to de la mortema korpo de la Apostolo Petro, glorigas
la vizaĝon de la senmorta Eklezio: unu, sankta, kato
lika kaj apostola, fondita de Jesuo sur la disĉiplo humi
la kaj malforta, sed fariĝinta solida roko, starigita ki
el centra fundamento de la nova Popolo de Dio (vd. Lu
men Gentium, n.oj 18-22); tiu festo antikva, ni diras,
iĝas aktuala en ĉi tiu nia celebrado, kiu, kolektante la
diversajn motivojn de sia preĝo, tiras el ĝi, kun la tra
diciaj esprimoj, ĉi tiun feston tute novan, kiu aldonas

al la spirita fervoro de la Sankta Jaro iun sian originan varmon, kaj transformas al pentekosta vento la ŝtormon mem de nia tempo timige minacanta ĉirkaŭ ni.

Ni ordigu niajn pensojn. La evangelia sceno rekunmetiĝu antaŭ nia spirito. Jesuo infano estas portata al la Templo, eĉ oferata al Dio, per eksplicita akto de agnosko pri la dia rajto super la vivo de l' homo. La vivo de l' homo, de la unuenaskito (El., 13, 12 ktp.), kiu ĝin simbolas, apartenas al Dio. La religia hierarkio de la kaŭzoj kaj de la valoroj estas en la naturo de la aĵoj; la religio estas ontologia postulo, kiun neniue ateismo, neniue sekularismo povas neniigi; nei, forgesi, malzorgi la homon povas, je sia risko kaj je sia malprofito; ĝin refuti esence, racie, sen perforto al sia penso kaj al sia esto li finfine ne povus; rekoni la religion, je la komenco de konceptado aŭtentika, ekzistanta de la aĵoj kaj de la vivo, estas neceso, estas saĝo; la kristanismo, eĉ se ni ne konsideras ĝin politika teokratio, tion konfirmas. S. ta Paŭlo, ekzemple, diras: "Neniue trompu sin mem... jes, ĉio apartenas al vi, sed vi al Kristo kaj Kristo al Dio" (I Kor. 3, 13, 22-23). Ĉu ne tiel vi ĉiuj, Religiuloj kaj Religiulinaj, vi ĉiuj Fideluloj, konceptas la vivon? Dio estas la unua, Dio estas ĉio; la akto unua, konsistiga de nia ekzisto, estas la akto religia, la adorado, la respekto, kaj beataj ni, kiuj estas invititaj fari el nia religio aplikadon de amo.

Jesuo aperas al ni, ekde sia origino en la tempo, kiel la interpretanto kaj la plenumanto de la volo de la Patero. "Enirante en la mondon - ni legas en la letero al la Hebreoj - ... mi diris: Jen mi venis... por plenumi, ho Dio, Vian volon!" (Heb. 10, 7); "mia nutraĵo - Li diros en la Evangelio - konsistas en la plenumo de la volo de Tiu, kiu min sendis" (Jo. 4, 34); "por tio mi malsupreniris de la ĉielo, por plenumi ne mian volon, sed la vo-



lon de Tiu, kiu min sendis" (Jo. 6,38) fakte, la tuta vi vo de Kristo estas superregata de ĉi tiu kunligo kun la dia volo, ĝis Getsemano, kie la homo Jesuo trifoje diros: "Ho mia Patro, se povas esti, ĉi tiu kaliko (de la baldaŭa pasiono) pasu for de mi; tamen ne kiel mi vo las, sed kiel volas Vi" (Mt. 26,39); tiel ke la epigrafon de lia surtera ekzisto S. ta Paŭlo tiel resumis: "Li sin humiligis, fariĝante obeema ĝis morto, eĉ ĝis morto per kruco" (Fil. 2,8). El la simpla sceno, preskaŭ nur epizoda, de la prezentado de Infano Jesuo al la templo, ni duonvidas la tragikan mesian dramon, kiu pe zas sur Li.

Ni ree travivas en ĉi tiu momento ne nur la memoron pri la evangelia fakto, sed ĝian elaĉetan misteron, kiu ĵetiĝas super nin, kaj kiu de ni petas la faman aliĝon de la Apostolo: "Ankaŭ mi plenumas en mia karnotion, kio mankas en la suferoj de Kristo" (Kol. 1,24). Fakte, Fratoj kaj Fratinoj vin votintaj al Kristo, por vi ĉi tiu rito proponas demandon, kies respondo kvalifikas kaj devontigas vian vivon; la demando koncernas la renovigon de viaj religiaj votoj. Kaj el ĉi tiu respondo, kiun certe eĥas tiu, kiun en sia koro ripetos la ĉeestantaj Fideluloj, memorantaj siajn baptajn promesojn, ni estas certaj, ke eliĝos, integra kaj nova, kompleta kaj feliĉa, via ofero, kunigita kun tiu de Jesuo: "Jen mi estas, sendu min!" (Jes. 6,8). Grandas tiel, kun tiu de Kristo, via destino. Ĉu vi volas?

Rimarku ankoraŭ. Maria ĉeestas, en la memoro de la rito, al kiu Ŝi, la plej pura, la senmakula, humile konformiĝis, tiu de la purigo preskribita de la mosea Leĝo (Lev. 12,6), silente gardante sian sekretan mirindaĵon: la dia patrineco estis lasinta netuŝita ŝian virgecon, donante al ĉi tiu la privilegion esti la anĝela sanktejo de la alia. Ĉi tie la fakto iĝas mistero, kaj

la mistero iĝas poezio, kaj la poezio amo, nedirebla amo. Ne, ja, rezulto sterila kaj senenhava; ne sorto malhumana, sed superhoma, kiam la karno estas oferata al la spirito, kaj la spirito estas trempita per la amo de Dio, plej viva, plej forta, plej absorba "kontenta kun la pensoj meditemaj" (Dante, Dia Komedio, III, 21, 117).

Kaj en nia hodiaŭa renkontiĝo kun Maria, la Virga Patrino de Kristo, lumiĝas en nia konscio la elekto, libera kaj suverena, de nia fraŭleco, de nia virgeco; ankaŭ ĝi, en sia inspira origino, estas plimulte dia graco ol virto; ni povas diri kun Kristo: "Ne ĉiuj homoj komprenas ĉi tiun diron, sed nur tiuj, al kiuj tio estas donita" (Mt. 19, 11). "Troveĝas en la homo - instruas S.ta Tomaso - superaj inklinoj, por kiuj li estas movata de dia influo", ili estas la "donacoj", la diaj gracoj, kiuj lin gvidas per interna instinkto je dia inspiro (vd. S.ta Tom. I-II, 68, 1). Tio estas la alvokiĝo! La alvokiĝo al la virgeco konsekrita, al la sankta fraŭleco, alvokiĝo, kiu, kiam ĝi estas komprenita kaj akceptita, nutras la spiriton per tiom da amo, ke ĉi tiu posedas ĝin tiom abunde, ke ĝi estas, per ofero, (tamen ofero facila kaj feliĉa), liberigita de la natura amo, de la sensa pasio, kaj faras el sia virgeco "neelĉerpeblan kontempladon" (vd. S.ta Tom. II-II, 152, 1), religion, ĉiam supere streĉitan kaj malsatan, kaj kapablan, kia estas neniu alia amo, verŝiĝi en la donon, en la servon, en la oferon de si mem por nekonataj fratoj, bezonantaj ĝuste oficon de karitato imitantan, aŭ plejeble egaligantan, tiun de Kristo por la homoj.

Ĉi tion oni travivas pli ol oni esprimas. Vi, Fratoj kaj Fratinoj, kiuj oferis vin al Kristo, tion bone scias. Kaj, se hodiaŭ ĉi tie vi kunvenis por esprimi per preĝoj kaj per simboloj ĉi tiun superegan programon de vi

vo en Kristo, per la penetrema esprimo de S.ta Paŭlo: "mihi vivere Christus est", mia vivo estas Kristo (Fil. 1,21), ni, ni mem, anstataŭ ricevi, kiel kutime en ĉi tiu okazo, el viaj manoj la benitan kandelon, simbolon de sinofero, kiu, konsumiĝante, disverŝas lumon ĉir - kaŭ si, ni donos ĝin al vi. Kaj ni ĝin donos ĝuste por honori vian oferon al la Sinjoro kaj al ĝia Eklezio, por konfirmi vian ĝojan promeson, por flamigi en vi tiun ka^uritaton, kiun eĉ ne la morto povas estingi (vd. I. Kor. 13,13).

Kun nia Apostola Beno.

trad. C.M.-P.M.

La festo de la Prezento de Jesuo (2an de februaro) - iam ĝi nomiĝis: Purigo de Maria - ricevis en ĉi tiu jaro, dediĉita al revigligo de la kristana vivo pere de la granda jubilea pardono, novan kaj signifoplenan kadron, kvazaŭ komenton al la vortoj de la enirkanto: "Ni ricevis, Sinjoro, vian mizerikordon en via templo...". Pro tio la Papo volis, ke ne nur la religiaj fratinoj oferu si an kandelon, kiel ĉiujare, sed ankaŭ la fratoj, ĉiuj ĝereligiuloj loĝantaj en Romo, devenintaj el ĉiuj nacioj. Ĝuste kiel prezentis Jesuon en la Templo de Jerusalemo Maria kaj Jozefo, kaj renkontiĝis kun li Simeono kaj Anna.

Fratoj kaj fratinoj ricevis kandelon antaŭ sia eniro en la baziliko de S.Petro, escepte de dek du, kiuj dum la ceremonio, ricevos ĝin de la Papo mem (v.foton, p.27). Post la litania alvoko de la Sanktaj Fondintoj de Ordenoj kaj religiaj kongregacioj, dek du generalaj superuloj reprezentantaj ĉiujn aliajn, renovigis antaŭ la Papo la religiajn votojn. Al ili la Papo respondis: "Kaj ni, nome de la Ĉiopova Dio promesas al vi la eternan vivon, se vi estos fidelaj en la observado de viaj vortoj". En

la tuta baziliko tondris la "Amen" de la religiula popolo, kiel solena subskribo al la papa promeso. Fine, beninte la kandelojn, la Papo levis sian brulantan kandelon, dirante: "Ricevu la lumon de Kristo, por ke de li lumigitaj vi kapablu marŝi kiel filoj de la lumo kaj via vivo ĉiam brilu anoncante la savevangelion, en la nomo de la Sinjoro". Tiam el la kandelo de la Papo estis bruligataj aliaj kandeloj kaj el ĉi tiuj ĉiuj aliaj, por esprimi la misteron de la gloro de Kristo, kiu per la sankteco de la homoj celas prilumi la tutan teron. Sekvis la solena meso, post kies evangelia legado la Papo faris la homilion, kiun ni supre prezentis.

ROMA ESPERANTA VOĈO

n.º 136

ALIĞIS AL LA 36a I.K.U.E.-KONGRESO EN ROMO:

- | | |
|-------------------|--------------------|
| 74. Bollini M. | 87. Kabala J. |
| 75. Szumska H. | 88. Biedulski C. |
| 76. Sobol B. | 89. Tomaszewski W. |
| 77. Downar-Z. H. | 90. T. " A. |
| 78. Mackiewicz A. | 91. Nowak C. |
| 79. Schrama A.J. | 92. Kowal W. |
| 80. Bacskowicz A. | 93. Glibowski A. |
| 81. Podzielny E. | 94. G. " H. |
| 82. Grabowski S. | 95. Kaplanek P. |
| 83. Woronowski S. | 96. K. " K. |
| 84. Kanczyk P. | 97. Bodecki Z. |
| 85. K. " M. | 98. Sulewski D. |
| 86. Widera S. | 99. Longoni F. |

- | | |
|---------------------|--------------------|
| 100. Bordogna E. | 111. Sola G. |
| 101. Marinaro B.A. | 112. S. F. |
| 102. Gröbner H. | 113. Serratrice M. |
| 103. Tic A. | 114. Krausová M. |
| 104. Kacmarek K.W. | 115. Bourdon L. |
| 105. Rudnicka-W. K. | 116. Savoia G. |
| 106. Rudzinska M. | 117. Bassetti A. |
| 107. Florczyk U. | 118. Dazzini C.G. |
| 108. Zielonka J. | 119. Kos J. |
| 109. Boklak M. | 120. Rejnic S. |
| 110. Terez W. | 121. Murak S. |
| | 122. Senes L. |
| | |

Ĝis nun: 122 el kiuj:
 15 el Romo,
 31 el aliaj ital. urboj
 51 el Poll.
 5 el Belg.
 4 el Nederl.
 2 el Hung., Jugosl., Franc., Ĉeĥosl.
 1 el Germ., Aŭstrio, Norvegujo, Hispanujo.

BALDAŬ APEROS en Espero Katolika la programo de nia kongreso. Tuj kiam ni ricevos, ni diskonigos ĝin ankaŭ pere de nia Katolika Sento.

En la listo supre donita, ni mencias nur la aliĝintojn, kiuj efektive pagis la aliĝon.

Ĝis la fino de marto la aliĝkotizo kostas £. 13.000. Post tiu dato ĝi kostos £. 16.000.

Oni sendu pagojn al : P. Giacinto Jacobitti, Piazza S. Maria Maggiore, 8 = 00185 Roma (Italujo): Pĝk 1/37638. Pa-
 gante per bankaj ĉekoj, bv. aldoni £. 1.000.

POR LA JUBILEA INDULGENCO

La indulgenco estas granda donaco, kiun la Eklezio faras nome de la ĉiela Patro pro la meritoj senfinaj de la Elaĉetinto.

Ĝia celo estas ne nur helpi la fidelulojn por ke ili riparu la merititajn punojn, sed ankaŭ por ke ili plenumu piajn, karitatajn kaj pentofarajn agadojn, ĉefe tiujn, kiuj favoras fortigon de kredo kaj ateston de la komuna kristana vivo (Konst. Apost. Indulgentiarum doktrina, n.8).

Kondiĉoj por la indulgenco.

Pentofaraj kaj fratecaj helpoj estas allasataj al memvola elekto.

Piaj faroj, kiujn oni devas plenumi kun humila kaj fervora koro:

- Ricevi la pentan kaj eŭkaristian sakramentojn (almenaŭ tri semajnojn antaŭ aŭ post la jubilea vizito);
- pilgrimadi grupe aŭ izolite al almenaŭ unu el la kvar bazilikoj (aŭ katakomboj aŭ preĝejoj destinitaj por la jubileo);

en la vizitata baziliko:

- estas laŭdinde, sed ne necese, eniri tra la Sankta Pordo;
- partopreni en liturgia celebrado, kiel en meso, en jubilea ofico (ĉiutage en S. Petro je 17 h.); en alia pentofara aŭ pia rito, kiel Krucvoja praktiko (en S. Petro-placo ĉiuvendrede je 18 h.); aŭ Rozario (ĉiusebte je 18 h.); aŭ mediti dum kelka tempo pri la granda mizerikordo de la Sinjoro; fine, oni povas reciti aŭ kanti "Patro Nia"-n, kredesprimon kaj alvokon al la Patrino de Dio;

- preĝi por la Papo kaj la episkoparo.
- Oni ankaŭ devas klopodi por havi malkonsenton al ĉiu peko eĉ veniala, kaj inklĭnon al amo al Dio kaj al la fratoj.

Avertoj

- La indulgenco povas esti oferata ankaŭ por la mortintoj, sed kiel alvoko al la dia kompato por ili (dum la jubilea indulgenco akirata por ni mem, se akompanata kun ĉiuj indikitaj kondiĉoj, estas kvazaŭ nova bapto, kiu garantias pardonon de ĉiuj niaj pekoj.

La tempo taŭga por plenumo de la "kondiĉoj" iras ĝis dudeko da tagoj antaŭ aŭ post la vizito al la baziliko. Por la preĝo laŭ la intencoj de la Sankta Patro kaj de la Episkoparo oni recitas, laŭ la plej komuna kutimo, unu Patronian kaj "Ave Maria"-n; sed oni estas tute liberaj elekti alian preĝon. La preĝo povas esti recitata dum la vizito al la baziliko, sed ankaŭ aliloke kaj alitempe, ekz. kiam oni komuniĝas.

- La jubilean indulgencon oni povas gajni plurfoje, en diversaj tagoj, valida gardante la normon laŭ kiu oni povas gajni nur unu plenan indulgencon dum unu tago. Necesas tamen ripeti la viziton (aŭ la partoprenon en iu liturgia celebrado aŭ en pia praktiko) kaj necesas ripeti ankaŭ la kondiĉojn, escepte eventuale de la pekkonfeso, kiu dum la taŭga tempo (maksimume tri semajnoj) povas esti unika por pluraj jubileaj (aŭ aliaj plenaj) indulgencoj.

Informoj

La Vatikana Radio dum la tuta Sankta Jaro transsendos plurlingvan programon ĉiutage de 8 h. ĝis 13, por servo al la pilgrimantoj, kun informoj utilaj al ilia roma restado.

Speciala aŭtobuso por la vizito al la kvar bazilikoj: n° 792 funkciadas ekde Kristnasko. Ĝi startas apud S. Petro kaj, haltiginte ĉe S. Maria la Granda kaj ĉe S. Jo hano en Laterano, atingas S. Paŭlon. El tiu baziliko laŭinverse ĝi reiras al S. Petro.

.....

Ĉiusemajne estas afiŝata ĉe la pordoj de la romaj preĝejoj bulteno entenanta kompletan liston de la jubileaj celebradoj, kiuj okazos dum la semajno en Romo. Ĝi krome informas pri apartaj ĉiutagaj programoj por junuloj, anoncas kongresojn, kunvenojn, prelegojn, gvidatajn vizitojn al katakomboj, muzeoj, ktp., kaj do nas ĉiujn utilajn informojn por la pilgrimantoj.

Preĝoj dum vizito al la Baziliko
por la akiro de la Jubilea indulgenco.

PATRO NIA, kiu estas en la ĉielo, - sanktigata estu via nomo. - Venu via regno. - Fariĝu via volo, - kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. - Nian panon ĉiu - tagan donu al ni hodiaŭ, - kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, - kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. - Kaj ne konduku nin en tenton, - sed liberigu nin de la malbono.

AVE MARIA, gracoplena, - la Sinjoro estas kun vi. - Benata vi estas inter la virinoj - kaj benata estas la frukto - de via sino, Jesuo. - Sankta Maria, Dipatrino, - preĝu por ni pekuloj - nun kaj en la horo de nia morto. Amen.

GLORO AL LA PATRO kaj la Filo kaj la Sankta Spirito. - Kiel estis en la komenco - kaj nun kaj ĉiam, - kaj en jarcentoj da jarcentoj. Amen.

MI KREDAS JE UNU DIO, - Patro ĉiopova, - kreanto de l' ĉielo kaj de la tero, - de ĉiuj aĵoj videblaj kaj ne videblaj. - Kaj je unu Sinjoro, Jesuo Kristo. - Filo ununaskita de Dio, - el la Patro generata antaŭ ĉiuj jar centoj: - Dio de Dio, - Lumo de Lumo, - vera Dio de Dio vera; - generata, ne farita, - samsubstanca kun la Patro; - per kiu ĉio estis kreita. - Kiu por ni homoj kaj por nia savo - descendis de l' ĉielo. - Kaj li enkarniĝis per la Spirito Sankta - el Maria Virgulino, kaj fariĝis homo. - Krucumita por ni sub Poncio Pilato, - mortis kaj estis entombigita. - La trian tagon li reviviĝis - laŭ la Skriboj, - ascendis ĉielen, - sidas dekstre de la Patro. - Kaj li revenos en gloro - juĝi la vivantojn kaj la mortintojn, - kaj lia regno estos sen fina. - Kaj je la Sankta Spirito, - Sinjoro kaj Viviganto, - kiu devenas de l' Patro kaj de l' Filo. - Kiu kun la Patro kaj la Filo - same estas adorata kaj kunglorata; - kiu parolis per la profetoj. - Kaj je la unu, sankta, - katolika kaj apostola Eklezio. - Mi konfesas unu bapton - por la pardono de la pekoj. - Kaj mi atendas la leviĝon de l' mortintoj - kaj la vivon en la mondo es tonta. Amen.

PREĜO POR LA SANKTA JARO (verkita de Paŭlo 6a)

Sinjoro nia Dio, Patro kaj amiko de la homoj, kiu volis rekonkordigi kun vi la tutan homaron en via Filo Jesuo Kristo, mortinta kaj reviviĝinta, rekonkordigante, tiel, ankaŭ ĉiujn homojn inter ili: aŭskultu la preĝon de via popolo en ĉi tiu jaro de graco kaj de savo.

(A) Aŭskultu nin, Sinjoro .

Via Spirito de vivo kaj sankteco renovigu nin en la pro fundo de la koro, kunigante nin, por la tuta vivo, kun

Kristo reviviĝinta, nia Savanto kaj Frato.

(A) Aŭskultu nin, Sinjoro.

Irante kun ĉiuj kristanoj sur la vojo de la evangelio, ni, fidelaj al la instruoj de la Eklezio kaj zorgaj pri la bezonoj de niaj fratoj, povu fariĝi konstruantoj de rekonkordigo, de unueco kaj paco.

(A) Aŭskultu nin, Sinjoro.

Fekundigu la klopodojn de tiuj, kiuj laboras je la servo de la homoj. Estu vi la espero kaj la lumo de tiu, kiu Vin serĉas eĉ ne konante Vin kaj de tiu, kiu, konante Vin, serĉas Vin ĉiam pli kaj pli.

(A) Aŭskultu nin, Sinjoro.

Pardonu niajn pekojn, firmigu nian kredon, stimulu la esperon, kreskigu la karitaton; faru, ke ni vivu sek-vante Jesuon, kiel Viaj tre amataj filoj.

(A) Aŭskultu nin, Sinjoro.

Via Eklezio, kun la patrina helpo de Maria, estu signo kaj sakramento de savo por ĉiuj homoj, por ke la mondo kedu je Via amo kaj je Via vero.

(A) Aŭskultu nin, Sinjoro.

Elaŭdu, Patro senfine bona, la preĝon, kiun Via Spirito inspiras al ni je Via gloro kaj por nia savo: per Jesuo Kristo Via Filo kaj nia Sinjoro, Vojo, Vero kaj Vivo dum ĉiuj jarcentoj.

Amen.

ĈEFA MOMENTO DE NIA jubilea pilgrimado estos la vizito al la kvar "Patriarkaj" romaj bazilikoj: S. Petro, S. Johano en Laterano, S. Maria la Granda, S. Paŭlo ekster la Muroj. Sed tiel riĉaj je religiaj kaj artaj monumentoj ili estas, ke ni devos nur tre supraĵe ilin trarigardi.

Enirante la placon S. Petro el strato de la Conciliazione (Repaciĝo) oni estas mirigataj de ĝia vasteco kaj majesto. Du kolonaroj el 284 kolonoj laŭ 4 vicoj formas kvazaŭ du brakojn, kiuj de la plej granda templo de la kristanismo celas brakumi la mondon. En la centro leviĝas la obelisko, kiun imperiestro Kaligulo transportigis el Heliopolo, kaj kiun Nerono destinis alla "Circus Maximus". Por starigi ĉi tiun necesis okcent viroj kaj 150 ĉevaloj.

La Baziliko de S. Petro en Vatikano estis konstruita sur la tombo de la unua apostolo, martirigita sub Nerono en la jaro 64. Je la mezo de la dua jarcento, sur tiu tombo en la enterigejo de malriĉuloj, flanke de la monteto Vatikano, daŭre vizitata de la piaj kristanoj, estis konstruita malgranda monumento: "memoraĵo". Kaj ĉi tiu kuŝas precize sub la Konfesaltaro, kiel dokumentis la tuta historio kaj elfosaĵoj de ĉi tiuj lastaj jaroj, kiuj atingis nerefuteble tiun pruvon (v. K. S. februaro 1970). Ĉe la tombo de la ĉefo de la apostoloj ni preĝos por la unueco de la Eklezio.

La navo de S. Petro estas longa pli ol 200 metrojn. Ĉio tamen en ĉi tiu baziliko estas tiel bone proporcia, ke je unua rigardo ĝi ofte seniluziigas la vizitantojn. Nur la studo de la detaloj montras, poste, ĝian grandecon. La transepto estas 137 m. larĝa. La kupolo atingas, ĝis la supro de la kruco, 132 m. Ĝia diametro 42 m. En la kvara jarcento imperiestro Konstanteno konstruigis la unuan bazilikon, kiu en la 16a jarcento estis anstataŭita de la nuntempa, la plej granda preĝejo en la mon

do. Ĉe la komenco de la dekstra navo, jen la "Pietà" skulptita de Michelangelo, nun, post la atenco de iu ĉirnezo, ĉirmita per kontraŭkugla vitro. Sur la altaroj dekstre kaj maldekstre ĉiuj bildoj estas mozaikoj laŭ originaloj de grandaj pentristoj. Dekstre de la navo, apogita al la lasta pilastro estas la bronza statuo de S. Petro, kies dekstra piedo estas forkonsumita de la kisoj de la fidelularo. Ĉe la fundo de la absido, ĉirkaŭ la "Katedro de S. Petro", estas la bronza kreaĵo, konata kiel "La Gloro de Bernini", ĉar en tiu centro okazas de beatigoj aŭ enkanonigoj, aperas tuj post ilia proklamo, la bildo de la nova beatulo aŭ sanktulo (v. K.S. Aprilo 1974, p.85). Malsupre de la kupolo, maldekstre, troviĝas la Vatikanaĵoj Grotoj, kun la tomboj de ĉiuj lastaj papoj, Benedikto 15a, Pio 11a kaj 12a kaj Johano 23a; dum la korpo de sankta Pio 10a, la papo kiu en 1906 anoncis la certan sukceson de Esperanto, kuŝas sub la altaro de la unua kapelo maldekstre.

Iam la papoj loĝis en palaco de Laterano. Sed post la brulegado de 1308, Gregoro 11a reveninte el Avinjono (1377), iris loĝi en Vatikano, kiu fariĝis tiamaniere la kutima loĝejo de la Papoj. De tiam multaj papoj riĉigis per palacoj kaj artverkoj tiun restadejon, mecenate alvokante la plej grandajn italajn artistojn, fondis muzeojn kaj bibliotekojn.

Vidinda nepre estas la Pinakoteko, pri kies artaĵoj estas tute ne eble eĉ resume paroli; kiel same multaj salonoj, galerioj, kabinetoj; la muzeo Chiaramonti, ktp., sed ĉefe la Siksta Kapelo, aŭ kapelo de la Konkilavoj, kun la freskoj de Michelangelo kaj de aliaj grandaj pentristoj. Impresigaj estas la "Ĉambroj" de Rafaelo: de la Brulego, de la "Segnatura" kun la "Disputo", la "Parnaso", la "Skolo de Ateno", de Heliodoro, de Konstanteno; la kapelo de Nikolao 5a; ktp. ktp. ... Oni devas tre rapide pasi de unu al la alia, esperan

te, ke poste oni povos rekonstrui en la memoro kaj trank
vile longtempe ĝui tiom da mirindaĵoj.

ASSEMBLEA "Costituente" del Gruppo di Roma della U.E.C.I.

Domenica 29 dicembre 1974 si è tenuta, presso il Pontificio Istituto di Studi Orientali, l'Assemblea "Costituente" del Gruppo di Roma dell'U.E.C.I.

Padre Jacobitti, nel dare inizio ai lavori, ha rin -
graziato il socio promotore sottolineando l'importanza
dell'iniziativa che nasce in concomitanza con due avve -
nimenti particolarmente importanti per i cattolici espe -
rantisti romani: la ricorrenza dell'Anno Santo ed il
Congresso dell'I.K.U.E.. Ha proseguito inoltre esor -
tando i presenti ad impegnarsi per l'affermazione del -
le finalità del Gruppo.

Il Sig. Angelo Scalia ha illustrato il significato, lo
scopo ed il programma del Gruppo, evidenziando la ne -
cessità di promuovere iniziative intese a diffondere la
conoscenza della lingua Esperanto nelle varie Parroc -
chie, Istituti religiosi ed Organizzazioni cattoliche ro -
mane.

E' seguita una breve discussione alla quale hanno
partecipato alcuni soci presenti.

Succesivamente è stato letto ed approvato il proget -
to di regolamento del Gruppo e si è proceduto alla vo -
tazione per eleggere il Comitato Direttivo.

I risultati della votazione sono i seguenti:

SOCI ELETTORI	19
" PRESENTI	11
" VOTANTI	10
SCHUDE VALIDE	10
" BIANCHE	-
" NULLE	-

Preferenze:

Di Tocco Vera	voti 10	Canevari Mario	voti 4
Jacobitti Giacinto	" 9	Messina Salvat.	" 2
Scalia Angelo	" 9	Canu Caterina	" 2
Merlani Mirella	" 9	Battaglia Ugo	" 1
Minnaja Carolina	" 8	Benassi Bruna	" 1
Patrizi Lea	" 6	Christiaens Jos.	" 1
Venezia Francesca	" 4	Tic Paŭlo	" 1

Sono risultati eletti: Di Tocco, Jacobitti, Scalia, Merlani, Minnaja, Patrizi, Venezia.

Nella prima riunione del Comitato Direttivo, tenutasi il 12 gennaio, sono stati eletti :

PRESIDENTE:	Sig. Angelo Scalia
VICE PRESIDENTE :	P. Giacinto Jacobitti
SEGRETARIA:	D.ssa Vera Di Tocco
TESORIERA:	Sig.na Lea Patrizi

Inoltre sono stati assegnati i seguenti incarichi:

Incaricato assistenziale:	Sig.na Mirella Merlani
Incaricato artistico- culturale:	Sig.ra Carolina Minnaja
Incaricato turistico- ricreativo:	Sig.na Francesca Vene zia

JE LA 19 DE JANUARO, la dimanĉo plejproksima al la forpaso de Luigi Minnaja, la Roma Esperanto Grupo, kiu decidis titoliĝi laŭ lia nomo, kvazaŭ por proponi lin al si kiel la plej luman modelon por vivo kaj agado, memorigis lin per sankta animripoza meso. Post la diservo, d-ro Antonio De Salvo reliefigis lian elstaran figuron antaŭ kunveno pli nombra ol kutime. Inter la partoprenantoj ĉeestis kelkaj geparencoj de la forpasinto. Ankaŭ ĉijare oni memorigos la Tagon de la Amikeco. Sed bedaŭrinde la verva inspiranto de tiu tago ĉijare silentos. Kiu povas forgesi, ke lia lasta poeziaĵo, kiu fariĝis kvazaŭ tradicio en ĉi tiu okazo, aperis pasintjare samtempe kun la tre malĝoja anonco de lia abrupta malapero, okazinta nur du tagojn post ĝia verkado?

ABONIS K.S.-on 1975: Bollate (MI): Zacché L.; Bolonjo: Gimelli G.; Brescia: Bordogna E.; Marinaro B.; Castellazzo B. (AL): Carassa G.; Castelnovetto (PV): Savoia G.; Florenco: Brovelli; Frattochie (Roma): Kellner G.; Ĝenovo: Bianchi F.; Limbiate (MI): Bolli ni M.; Longoni F. Mantova: Bardini M.; Massa: Daz zini C.; Milano: Serratrice M.; Bongiorno E.; C.C. Ferrari; Mondovì (CN): Beccaria P.; Orlandini F.; Pis toia: Stoppoloni U.; Reggio Emilia: Munarini V.; Rimi ni: Magnani D.; Ceccarelli M.C.; Fabbri A.; Romo: Menabene A.; Sulewski D.; Macak L.; Korytkowski G.; De Angelis R.; Cimino C.; Minnaja C^a; Torino: Bru sa S.; Vercelli: Cerutti G.; Sola L.; Sola M.; Vero na: Galbusera F.; Vicenza: Stocchiero G.; Aŭstru jo: Gröbner H.; Dürschmid K.; Casar F.; Britujo: Vigar N.; Ĉeĥosl.: R.B.; Franc.: Augen A.; Vincent J.; Bourdon L.; Hispan.: Armelles J.; Hung.: Szénà si S.; Vári M.; Jugosl.: Oreb I.; Herbut G.; Norvegu jo: S. Murak.; Poll.: Downar Z.H. Szumska H.; Jaku bicz J.; Kabala J.; Kanczyk P.k.M.; Leszczyna-G.A.

Kowal W.; Tomaszewski W.; Nowak C.; Biedulski C.; Widera S.; Kaplanek P.; Baczkowicz.; Podzielni E.; Grabowski A.; Woronowski S.; Kaczmarek K.; Chomik A.; Dlugosz T.; Katarzyna W.; Dycka S.; Bodecki Z.; Leszek H.J.; Sobol B.; Sulewski D.; Rudnicka-W.K.; Rudzinska M.; Florczyk U.; Zielonka J.; Boklak M.; Tic A.; Krausová M.; Kowalczyk G.; Martynski K.; Piwowarski I.; Kos J.; Kucewicz Z.; Usono: D.Q.McInerney; Kent J.R.; Schmidt L.H.; Nederl. Durenkamp T.; Schrama A.J.; USSR; Judickiene A.;

Ni sendas K.S.-on al ĉiuj aliĝintoj al la Kongreso por ke ili el ĉi tiu revuo ricevu multajn utilajn informojn pri tio. Ĉiuj, kiuj ne pagis aparte por la abono, povos pagi ĉi tion kun ĉiuj aliaj elspezoj por la pensiono. Oni povas pagi per pĝk. rekte al P.Jacobitti (vidu la internan flankon de la kovrilo).

KIEL ANONCITE EN Katolika Sento, nov. 1974, p. 245, nia Roma Grupo en la Tago dediĉita por helpo al la misiistoj, transdonis al la Pakistana misio £. 100.000 el sia Bonfara Kaso. P. Pio D'Souza, ricevante la donacon, respondis danke (trad. el la itala lingvo):

"...Nome de niaj malriĉaj kristanoj, al kiuj mi intencas transdoni la oferdonon de 100.000 liroj, por helpi ilin en ilia mizero, mi dankas vin kaj la Roman Esperanto-Grupon. Estis vera afableco memori pri niaj kristanoj dum la Kristnaskaj festoj. Fakte multaj el ili dum la kristnaska tago havos eĉ ne la panon necesan! Bedaŭrinde ĉi tie oni estas tre malriĉaj. Ni troviĝas en la Tria Mondo, kie ekzistas tiom da mizero; kaj nun, pro la ekonomia inflacio, nia ekonomia stato estas eĉ pli peza. Se vi en Eŭropo havas problemojn pro la inflacio, imagu kio estas ĉi tie en la tria mondo!

Por doni al vi malgrandan ideon pri tio, mi citas al vi nur unu ekzemplon. Mi administras grandan orfejon "Madono de Fatima", kiun mi mem fondis antaŭ 17 jaroj. Kiam mi komencis ĉi tiun, mi povis vivteni orfon dum monato per 3.000 liroj, dum hodiaŭ ne sufiĉas 12.000.!

... Al vi kaj al la Roma Esperanto-Grupo miajn plej sincerajn bondezirojn por la Nova Jaro.

31-12-'74

P. Pio D'Souza

(Al la ne-romaj donacintoj, kiuj helpis la Bonfaran Kason, kompreneble, etendiĝas la danko de la pakistana misiisto).

El la Katolika Eklezio

SOLENA BEATIGO, kunigita al la programo de la Sankta Jaro 1975, okazis la 10an de februaro en Sankta Petro. Temis pri la franca Maria Eŭgena Milleret de Brou, fondintino de la Fratinoj de la Ĉielenprenita. Ne plu, kiel ĝis nun, la ceremonio estis rompita, tiel dire, en du partojn. Ĉar, antaŭe, je la mateno la celebrado estis farita per la Kapitulo de la Sankta Petra baziliko, kaj konsistis en la legado de la beatiga dekreto kaj en la meso honore al la nova beatulo. Vespere la Papo malsupreniradis en la bazilikon, por honori la novan beatulon. Sed nun, laŭ la aktuala rito, la beatiga ceremonio estas unika.

Komence de la meso, kard. Marty, ĉefepiskopo de Parizo, al kies diocezo la nova beatulino apartenis, prezentis al la Papo, kiu prezidis la riton, peton por la beatigo, aldonante mallongan priskribon pri ŝi kaj pri la disvolviĝo de la kanona procezo. Kaj la Papo, prokla-

mante ke la Servantino de Dio Maria Eŭgena povas esti nomata Beata, fiksis je la 10a de marto - en kiu ŝi, mortante al la mondo, naskiĝis al la eterna vivo - , la tagon por la liturgia celebrado honore al ŝi. En tiu sama momento la bildo de la nova beatulino montriĝis en la "Gloro" de Bernini, dum neeltenebla aplaŭdo vibrigis la majeston bazilikon. Kiam ĝi finiĝis, tute nova muziko aŭdiĝis: estis la tamtamo de Ruandaj fratinoj, kiuj, kun sennombraj aliaj filinoj de la fondintino, venis al Romo. Ili reprezentis la multajn aliajn, kiuj en 135 komunumoj disigitaj inter 30 nacioj laboras, preĝas kaj sanktiĝas laŭ la spirito de la fondintino.

Inter la aliaj beatuloj, al kiuj oni donos en ĉi tiu Sankta Jaro la plej altan gloron de la altaroj, kelkaj estas lastatempaj, aliaj havas pli antikvan daton, de la 16a ĝis la 19a jarcento. Inter ili estas martiro de la reformacia tempo, ĉefep. Oliver Plunkett (+1681); kunlaboranta frato, Johano Macias (+1645), samaĝa kaj samtempa al S. Marteno de Porres; Justeno de Jakobis (+1860), misiista episkopo, kiu pasigis grandan parton de sia vivo en Etiopio; Johano Baptisto de la Senmakula Koncipiĝo (+1613) mistika reformisto de ordeno; la unua sanktulino naskiĝinta en Usono, Elizabeta Anna Bayley, vidvino Seton (+1821), patrino de 5 filoj, kiu, kvankam denaske protestanta, sekvis la katolikan kredon post la morto de sia edzo, fondis en Usono la unuan katolikan lernejon kaj tre florantan religian ordenon, kiu sin dediĉas al la edukado de la junularo. Kaj fine estos enkanonigita sanktulino, Vincenta Maria Lopez Vicuña (+1890), kiu dediĉis sian vivon al karitato favore al la plej malriĉaj klasoj kaj fondis religian instituton por la hejmaj kunlaborantinoj.

INTERESA ELMONTRO de dokumentoj kaj atestoj pri la Sankta Jaro estis malfermita de la Sekreta Vatikana Arkivo la 8an de februaro kun la ĉeesto de la Papo. Oni

tie rigardu ĉiujn proklamajn buleojn de la 2^a Sanktaj Jaroj kaj de la eksterordinara pri la 19a jarcenta datreveno de la Elaĉeto: 172 aŭtentikaj dokumentoj, reproduktaĵoj kaj volumoj. Kard. Antonio Samoré, Arkivisto de la Sankta Roma Eklezio, inaŭgurante la kolekton, ilustris al la Papo la eksterordinarajn dokumentojn, komencante ekde la unua, datita 22 de februaro 1300, per kiu papo Bonifaco 8a proklamis - oni povas diri laŭ postulo de la popolo - la unuan Sanktan Jaron. Temis pri la originala dokumento (eĉ unu el la originalaj, ĉar ili estas tri), de la proklama Buleo nomata "Antiquorum habet", kiu malfermas la serion de almenaŭ 200 aliaj dokumentoj, tre gravaj por la eklezia historio. Kvankam ekzistas jam multaj valoraj studaĵoj pri la jubilea temo, kompleta historio de tiu elstara signo de la dia pardono en la Kristeklezio, nun unuafoje ebla al la studemuloj, ne estis ĝis nun prezentita. "Ĉi tiu elmontro - rimarkis la papo - bone atestas, ke la Sanktaj Jaroj ĉi - am disvolviĝis laŭ la religia sento de la kristanoj, kiuj irante al la katedro de Petro intencis plifortigon de sia kredo kaj liberigon de ĉiu peko, kiu bremsas elan - non de la kristana vivo".

RIMARKINDAN SUKCESON atingis la germanlingva traduko de la Nova Testamento, prizorgita kune de la katolikaj kaj protestantaj Bibliaj Societoj en Germanujo. La eldono, aperinta en 1968 kun la titolo "Die Gute Nachricht" (La bona anonco), atingis fakte en la ĵus pasinta monato unu milionon da ekzempleroj. Ekde 1973 estas havebla pri ĉi tiu teksto ankaŭ ekumena komentita eldonaĵo. Simila versio de la Antikva Testamento estas en prelo.

LONDONO. Nova versio de kelkaj mespartoj. La katolikaj episkopoj de Britujo kaj Kimrujo anoncis, ke ekde 16 de marto 1975 estos deviga la nova angla versio

de kelkaj partoj kiuj devas esti akompanataj de la fidelularo, t.e. "Gloro al Dio", "Kredo", "Sankta" kaj la dialogo inter la sacerdote kun la ĉeestantaj kredantoj, komence de la Eŭkaristia preĝo. Ankaŭ la katolikaj episkopoj de Skotlando kaj Irlando anoncis, ke la samaj ŝanĝoj estos samdate enkondukataj. Per ĉi tiuj novaj versioj la episkopoj celas unikan liturgian tekston por ĉiuj anglalingvaj landoj.

DAL MONDO ESPERANTISTA

Esperanto lingua ufficiale: L'Esperanto sarà, con l'inglese ed il francese, la lingua ufficiale durante il congresso internazionale che avrà luogo nel Quebec sul tema "La scuola come strumento di pace". Per informazioni: E I P = 27 rue des Eaux Vivas = 1207 Genève = Svizzera.

Trieste: La bella città giuliana è la sede prescelta per il prossimo Congresso Nazionale Italiano di Esperanto (settembre 1975). Appena in possesso forniremo informazioni più precise.

Rotterdam: Presso l'UEA è ora il solo recapito del C.E.D., dopo la chiusura del suo secondo ufficio londinese. Sotto la nuova direzione del dott. Jonathal Pool, il C.E.D. proseguirà la sua utile attività (dokumentoj - la mondlingva problemoj, ecc.).

Copenhagen: proseguono con successo l'organizzazione del 60° Congresso Internazionale (26.7 - 2.8.75) e quella della 31ª Conferenza internazionale giovanile che si svolgerà nella vicina Fredericia dal 19 al 26.7.75.

Berlino: Giunge notizia che l'edizione in esperanto del romanzo "Nudo fra i lupi" di Apitz è esaurita presso la casa editrice. Era apparsa in 8000 copie, pochi mesi fa.

Incontro per giovani a Venezia: La 2^a Printempa Junulara Kunloĝado avrà luogo dal 25 al 27 maggio. Per adesioni rivolgersi a: Nicoletta Amadio= Cannaregio 628 30121 Venezia.

Congresso Britannico di Esperanto: Il 59° Congresso Britannico di Esperanto avrà luogo a Royal Leamington Spa dal 23 al 26 maggio. Per adesioni: 59° Brita Kongreso de Esperanto= 124 Derryoown Road= Birmingham B42= IRU =Gran Bretagna.

Gli Esperantisti navigano il Danubio: Gli Esperantisti sono invitati a conoscere meglio il Danubio. A questo scopo è stato organizzato un lungo viaggio sul fiume dal 15 al 26 giugno. Il piroscafo sarà riservato ai soli esperantisti e partirà da Budapest. Le quote, comprensive di trasporto, vitto ed alloggio, vanno dalle lire 120.000 = alle 170.000. a seconda della categoria. Per adesioni: Universala Esperanto-Asocio=Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando, anticipando lire 25000.=

Congresso Canadese di Esperanto: Gli esperantisti canadesi ed i partecipanti stranieri, si incontreranno nella città di Calgary dal 28 al 30 giugno in occasione del 100° anniversario della fondazione della città. Particolarmente interessanti saranno le manifestazioni folcloristiche e gli spettacoli. Per adesioni: Kalgaria Esperanto-Grupo = 3019 Hampton Crescent S.W. Calgary = Alberta = Kanado T3E 4R1.

Seminario a Milano: In primavera avrà luogo un seminario su "La comunicazione e l'organizzazione sociale". Il seminario sarà in lingua italiana con traduzione simultanea in Esperanto, organizzato dalla F.E.I. e dalla IEJ sotto gli auspici della TEJO. Per informazioni: Ing. Sergio Martina - Via Gustavo Modena 12, 20129 Milano.